

EFM 8/2014

El fervoja mondo 8/2014

Azerbajĝano: **Evoluas kunlaboro kun Rusio kaj Alstom**

Azerbajĝanaj Ŝtataj Fervojoj (*ADY*) aĉetos kvindek modernajn elektrajn lokomotivojn tipo *KZ8A* de konsorcio *EKZ*. La novaj dumodulaj lokomotivoj estos kapablaj trafiki per rapido 120 km/h. Ili estos produktataj en kazaĥa ĉefurbo Astano en komuna entrepreno de *Alstom*, Kazaĥaj Fervojoj, kaj rusa *Transmasholding (EKZ)*.

La novaj 35 metrojn longaj ducenttunaj lokomotivoj estos movataj fare de asinkronaj motoroj kun povumo 8800 kW, do ili povos treni ankaŭ pezajn vagonarojn ĝis naŭmiltunajn. La kompanio *Alstom* subskribis ankaŭ memorandon kun urbo Bakuo pri evoluo de novaj vagonoj por metroo.

Britio: **Kaledoniaj litvagonoj havas alian ekspluatanton**

Kompanio *Sercu* ricevis francizon por ekspluatado de kaledoniaj litvagonoj por 15 jaroj sur fervojlinioj inter Londono kaj diversaj urboj en Skotlando ekde aprilo 2015. Francizo tial anstataŭos nunan ekspluatanton, kiu estas kompanio *FirstGroup*. *Sercu* devas garantii ankaŭ investon 100 milionoj da sterlingoj por nova veturilaro kaj aliaj plibonigoj. Programo de renovigo krome estas plifortigita de fondusa subteno 60 milionoj da sterlingoj, kiun disponigos skotlanda registaro. Veturiloj estos ekipataj per litoj en apartamentoj de unua klaso, per klapseĝoj modifeblaj al ebenaj litoj, kaj per bierejo en stilo de klubvagono.

Ĉeĥio: **Ŝaka trajno denove ekveturos**

Ĉu vi ŝatas ŝakon kaj vojaĝadon? Vi do povas ankoraŭ aliĝi kaj vojaĝi inter 10-a kaj 14-a de oktobro 2014 en ŝaktrajno sur vojaĝitinerio Prago – Vieno – Budapeŝto – *Trenčín* (en Slovakio) – Krakovo – Prago. En la ŝaktrajno, kies veturon organizas Praga ŝaka kompanio en kunlaboro kun Ĉeĥaj Fervojoj (*ČD*) kiel ĝenerala partnero, vojaĝantoj povos dum veturo inter unuopaj urboj ludi turniron en rapida ŝako, kaj persone konatiĝi ankaŭ kun kelkaj ŝakaj grandmajstroj. Por la plej bonaj ŝakludantoj estas preparitaj interesaj kaj valoraj premioj. Tranoktadon en unuopaj antaŭdestinitaj urboj partoprenantoj povas aŭ mendi mem, aŭ uzi hotelojn rezervitajn fare de organizanto.

Kostojn en hoteloj kaj aliajn informojn pri ŝaka trajno oni povas trovi sur retpaĝo www.sachovy-vlak.cz.

Germanio: **Germana Fervojo: nova manipulado kun pezaj pecvaroj**

Tiel nomata „gruo de helpa funkciado“ fine de majo 2014 levadis por prezentaj celoj 70-tunan provpezaĵon sur areo de entrepreno *Kirow Ardel* GmbH en Lepsiko (*Leipzig*). Por fervoja gruo „*Multitaster 1200*“ tio estis facila, ĉar ĝi povas levadi ĝis 160 tunojn. Temis pri unua el kvin grupoj de helpa funkciado de Germana Fervojo. Infrastruktura kompanio *DB Netz AG* investos 35 milionojn da eŭroj, por anstataŭigi fervojajn grupojn devenantajn el 1970aj jaroj. Novaj grupoj estas pli rapide ekfunkcieblaj, ebligas veturon dum samtempa trafiko sur najbara trako, kaj povas eĉ veturi kun portata pezaĵo.

Hispanio: **Nacia trafikisto devas helpadi al konkurenco**

Hispana registaro aprobis alvokon pri proponproceduro por ekspluatado de komerca longdistanca pasaĝertrafiko, kaj ties ekspluatanto konkurencos al ŝtata operatoro *RENFE*. Venkinta adepto rajtos ekspluati trafikadon dum sep jaroj sur ĝenerale uzataj kaj grandrapidaj fervojlinioj de reto *Levante*, kaj plenumi tiel trafikadon el Madrido al urboj *Albacete*, *Valencia*, *Castelló de la Plana*, *Alacante* kaj *Murcia*. Filio de *RENFE* al venkinto devos disponigi veturilaron ĝis tempo, kiam ĝi havos sian propran. Post sep jaroj la reto *Levante* fariĝu plene malfermita al konkurenco. La registaro atendas, ke konkurenca batalo altiros al fervojo pli multajn vojaĝantojn.

Kroatio: **Al Slavonski Brod revenas produktado de lokomotivoj**

Produktisto de varvagonoj *Duro Dakovič* kaj firmao *Newag Gliwice* en Pollando subskribis interkonsenton, kies rezulto estas produktado de elektraj lokomotivoj *E4ACU* en modifo *25 kV/50 Hz Newag Griffin*, produktata en *Slavonski Brod* por kroata kaj alia merkato. La entrepreno *Duro Dakovič* pli frue orientiĝis al dizelelektraj lokomotivoj, sed nuntempe produktas nur varvagonojn. La kontrakto signifas, ke al *Slavonski Brod* post 23 jaroj produktado de lokomotivoj revenas! Krome, elektraj „maŝinoj“ ĉi tie aperas tute unuafoje. „Danke al interkonsento alte sofistikaĵoj scioj revenos en la landon“, komentariis la mendon *Vladimir Kovačević*, estrarprezidanto de la firmao *Duro Dakovič*.

Nederlando:

Konflikto pri grandrapidaj veturiloj solvita sen proceso

Inter Nederlandaj Fervojoj (*NS*) kaj produktanto de relveturiloj *AnsaldoBreda* estis solvita konflikto pro perturboj de grandrapidaj veturiloj *V 250 FYRA*. Ambaŭ partneroj akceptis senprocecan interkonsenton. *AnsaldoBreda* retransprenos ĉiujn dek ses menditajn kombinaĵojn, el kiuj naŭ *NS* jam transprenis, kaj redonos al Nederlandaj Fervojoj 125 anstataŭ postulataj 213 milionoj da eŭroj. Nederlandaj Fervojoj anoncis malprofiton kunligita kun veturiloj *FYRA* je 247 milionoj da eŭroj. *AnsaldoBreda* provos veturilojn *V 250 FYRA* vendi al alia kliento. Se tio sukcesos, nederlandanoj ricevos de ĉiu vendita kombinaĵo ĝis 21 milionoj da eŭroj.

Pollando:

Kredito por modernigi fervojlinion Katowice – Krakow

Eŭropa investa banko pruntedonis al administranto de nacia fervoja reto en Pollando, kompanio *PKP*, krediton 268 milionoj da eŭroj. Pruntedonita mono estas destinita por modernigi 58 km longan fervojlinion el *Katowice* al *Krakow*. Sur tiu ĉi linio okazos interŝanĝo de ŝpaloj kaj kontaktlineoj, ankaŭ modernigo de provizadfontoj. Planata estas ankaŭ alikonstruo de kelkaj stacioj atente al bezonoj de handikapitaj vojaĝantoj. Modernigo ebligas ekspluatadon de pasaĝertrajnoj kun rapido ĝis 160 km/h. Trajnoj destinitaj por vartrafiko povos atingi rapidon ĝis 120 km/h. Laboroj por modernigo de fervoja linio laŭplane finiĝos en jaro 2016.

Rumanio:

Enlanda motorvagonkombinaĵo Hyperion ekde junio 2014 servas apud Bukareŝto

Rumanaj Fervojoj (*CFR*) en junio 2014 entrafikigis elektran vagonkombinaĵon de enlanda produktado, kiun fervojistoj alinomas *Hyperion*. Prototipo de la veturiloj estis preta jam en jaro 2013, kaj ekde januaro 2014 plenumis diversajn teknike-sekurigajn ekzamenojn. La kvarvagona elektra kombinaĵo estis konstruata laŭ plano el 1990-aj jaroj en entrepreno *Softronis* en *Craiova*. La veturilkombinaĵo havas kapaciton por 180 sidantaj pasaĝeroj, estas parte basplanka, klimatizata, ekipita per konektiloj, kaj ofertas *wi-fi*-ekonekton al interreto. Al pasaĝeroj ĝi aktuale servas sur linio inter Bukareŝto kaj *Craiova*.

Svisio:

Trajnoj por fervoja linio tra tunelo Gotthard liveros Stadler

Kompanio *SBB* baze de publika konkurso transdonis mendon por produkti 29 grandrapidajn motorvagonkombinaĵojn en valoro ĉirkaŭ unu miliardo da svisaj frankoj por nord-suda akso en nova baza tunelo *Gotthard* kaj *Ceneri* al kompanio *Stadler*. Tiu ĉi produktisto ricevis ankaŭ prioritatan aĉetrajton por produkti pluajn 92 kombinaĵojn. Ili atingadu rapidon 249 km/h, estu ĉirkaŭ 200 metrojn longaj, kaj kiel dukombinaĵa vagonaro ofertu 800 sidlokojn. En trajno eblas trovi restoracian vagonon, senbruan, familian, kaj unuaklasan zonojn, kaj ankaŭ tualetejojn por pasaĝeroj en rulseĝoj. *SBB* atendas, ke post malfermo de nova linio nuntempa nombro 9 mil vojaĝantoj en tago ĝis jaro 2025 duobliĝos.

Svisio:

Urbfervojo en Zuriko ricevis tunelon kaj pliajn pasaĝerkajojn

En unua duono de junio 2014 komenciĝis pasaĝertrafiko sur “diametrolinio“, kiu parte iras tra tunelo sub la urbo Zuriko. La linio 9,6 km longa ebligas trafiki rekte tra la urbo tiel, ke trajnoj en direkto oriento - okcidento ne devas en zurika ĉefstacio = sakstacio ŝanĝi veturdirekton. Centra elemento de tiu ĉi projekto estas 4,8 km longa dutraka linio, subterigita en tunelon *Weinberg*, kaj komenciĝanta en okcidenta parto, atingante zurikan ĉefstacion kaj kurbiĝanta en formo S, por alligi al ekzistanta linio en *Oerlikon* en direkto nordokcidento. En *Löwenstrasse* estis konstruataj subteraj kajoj 31 – 34.

Laŭ *Železničář* kaj *Cargovák* preparis *Jindřich Tomíšek*,
reviziis *Heinz Hoffmann*